GISTO APRIL-2010.
Strato Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Donaca por VerdKafaj ĉeestantoj
Krom foraj loĝantoj ,R$ 1,00.

.....

E-EVENTO

Kvankam kunsida grupo da samideanoj aprobis la ideon de kunfratiĝa tagmanĝo en la naŭa de majo venonta, Zelja utiltempe informis min ke tiam estos la Patrina Tago kaj ke tio certe malhelpos ke granda nombro venos al nerutina E-kunsido. Dankon al Zelja, pro la afableco sendi al mi mesaĝon! El tio rezultas ke, espereble, ni povos kune tagmanĝi en la sabato 08/05/10.

BRAZILJA

Mi, 13/4 19,00h, fintelefonis kun nia plej flugema samideano Arno. Pokajn minutojn antaŭe la geedzoj estis revenintaj el Brazilja kaj mi mem eble ankaŭ devos flugi tien. Oni sciigis min ke la sanstato de mia frato Teo malpliboniĝis. La reveno iom dependas de lia reboniĝo. Ĝuste ĉisemajne kiam mi devas retajpi preskaŭ la tutan Gisto. Okazis denove ke, kiam mi finfaris la trian kolumnon damninda koboldo igis min premi klavon maldekstre de la klavaro. Mi tute ne scias ŝirmi min kontraŭ tia "kraŝo". Ĉu iu el la gelegantoj posedas la bonecon helpi min identigi kiun klavon plus alia kaŭzas la frakason de la tuta teksto kiu cetere estis plurope savita dum mi arigas la plurajn teksterojn. Mi tree bezonas arkitekti artifikon kiu neniam plu allasos ke mi mistajpos kaj perdos preskaŭ tutan paĝon finredaktitan!! Pluraj lertuloj provis eltrovi la perditan tekston sed estis tute vana klopodo. Se neniu prezentos rimedon eviti la perdon, mi eble devos manskribe teni kopiaĵon.

REDAKTADO

Rimarkeblas ke la gaŭĉaj gesamideanoj, eĉ la flue parolantaj, kiam devas skribi etan noton, tro multe ripetas la (egoisman) pronomon MI en sama teksto. Ekzemple: "MI ricevis vian mesaĝon, MI respondas al vi...MI sugestas... MI pripensos...MI...MI ! Notindas ankaŭ la ripetatajn verbojn ESTAS, de ili oni povas ofte devojiĝi. Laste kaj ege ĝena fariĝas troa uzado de la difina artikolo LA. Tial, ne vane oni legas rikanojn kontraŭ nia juvelo, laŭ kiuj nia lingvo estas LA LAMA LANDO DE LA LALINGVO ! Do oni devas honti se ni kulpas liverante pravigan municiojn al niaj kritikantoj. Ĉikaze preferindas laŭeble elekti frazon kun pluralaj vortoj. Anstataŭ por "LA pli bonaj estas multekostaj, oni povas diri, jene "bonaj multekostas" sen kaŭzi grandan ŝanĝon en la signifo.

Longe mi atendis ke iu lertulo proponus ĉi sugeston:kiu fidas je mia magra scio kaj kuraĝos iom lertigi sin kaj iom plibeligi sian lingvouzon, tiu bv.kontakti GEA-anojn, arigi grupon kaj signi tagon kaj horon, **dumtagan**, kie mi fariĝu ĉeestanta. Por mi indiferentas ĉu en GEA aŭ aliloke, kondiĉe ke estu ĝi centre de POA. Mia propono celas ke neniu verda gaŭĉo komuniku sin timema pri siaj eraroj dum parolado aŭ skribe, eĉ per eta mesaĝo, ĉefe se ĝi estas adresita al E-organizaĵo brazila, des pli gravas NE ERARI kiam ĝin devas legi fremdlandaj gesamideanoj. Kia honto!!
Aŭ, ĉu ni ĉiuj brazilanoj estu dumvivaj senhontuloj?

TREZORO

Nia kara lingvo kompareblas al plezurŝipo kiun oni devas per laciga laboro akiri, por ĝui tian valoran utilaĵon nome, veturi al E-kongresoj kiuj okazas tra la mondo. Per laciga laboro vi komprenu: plene ellerni la lingvon, por rajti senpagan veturbileton. Por rajti, komprenu: libere kaj sentime interparoli kun kiu ajn grupo da kongresanoj. Ne pigru, klopodu daŭre. Se dum legado al vi mankas la signifo de vorto, ne prokrastiĝu, tuj kunvoku la vortaron! – Pri ĉi temo, mi bedaŭras. Iam Gisto demandis, kiom da diferencaj kaj uzataj vortaroj vi posedas?? Se nur du vortaroj, vi ŝuldas multon al viaj kompanoj, cele elstarigi la kapablon de gaŭĉaj esperantistoj. SORRY, dirus anglo!

MAJO 08.05.10

Mi invitas: estu miaj gastoj ĉiuj gesamideanoj kiuj libertempos kaj flue scias reciti almenaŭ etan tekston en Esperanto je la alveno, en la sabato 08/05, dum tagmanĝo en la memserva manĝejo nomata PER TUTTI, je la 12,30h. Ĝi situas ĉe strato Mal.Floriano nº 44, sur la dua etaĝo, centre de POA. Motivo de la kunsido:Ŝajne la koro de ĉi oldulo baldaŭ rajtas senlime feriadi. Espereble mi trompiĝas... do rara trompo kiu bonvenos! -- Eble ni rajtos resti en la manĝejo post la tagmanĝo, por iom « brui » per verdaj manifestoj . Ĉiu bv veni kun oleumita lingvaĵo, por varbi novajn geamikojn kaj eblajn interesatojn pri nia idealo. Laŭ mi, virinoj plej scias logi fremdajn homojn, por aŭskulti almenaŭ iomete pri la strukturo de nia verda varo krom la aspekto de skribita teksto. Ni konsentu ke, je la unua ekvido, ne-esperantiston impresas negative tiuj vortoj kun enhava-J, la nekonataj ĉapelitaj literoj, ktp.ktp.

GAŬĈAJ POPOLDIROJ

El la Preso.

-Se hida vizaĝo kaŭzus ektimon, mi ne riskus alrigardi spegulon.

-Hundo ŝafovora mortas kun la kapo turnita al grego.

-Du bekuloj ne sin kisas reciproke.

-Kolera malbeno de katarto ne mortigas grasan ĉevalon.

Porka LARDO.

La ŝajne usonangla vorto “BACON” pron.beikon, envere originas el la franca kun la signifo lardo. Pratempe la ĉefa dekonaĵo por la Eklezio, en Francio estis lardo.

RECEPTOJ

Ekde la pasinta semajno kuracistoj nepre devas skribi receptojn per manskribo facile legebla.

Humuro>

SUKCESO

Konsideratas sukcesoplena viro tiu, kiu enspezas pli ol elspezas lia edzino.

- kaj sukcesoplena virino?

- Estas, tiu kiu sukcesis fiŝkapti tian edzon. (Ĉu trioble salajrata senatano?)

KORO

Mekanikisto malmuntas motoron kaj tiun momenton envenas la riparejon konata ĥirurgiisto.

- Doktoro, ĉu mi rajtas fari unu demandon al vi?

-Jes, ja mia amiko, faru vian demandon.

– Do bv diri al mi: kial mi devas ŝviti kaj laboregi por malmunti kaj remunti dekojn da pecetoj por ke la motoro denove bone funkciu sed mi, por tio laborego, gajnas kompareble nur mincan pagon kaj vi ricevas stakon da bankbiletoj? La doktoro ridetas, iom klinas sin kaj mallaŭte sufloras en la orelon de la mekanikisto:

- Provu fari tion dum ĝi funkcias...